



**madrida esperanto-liceo**

**septembro 2013**

### **PAGO DE SUBVENCIO**

Post iom penaj demarŝoj kaj plenumo de foje kapricaj postuloj, komence de julio la madrida Magistrato pagis en la bankan konton de Madrida Esperanto-Liceo la sumon de 716,75 euroj. Tio estas la subvencio aljuĝita al MEL en majo de 2012, por: 1) aĉeti specialan skanilon; 2) produkti la duan eldonon de la ekspozici-paneloj, kaj 3) efektiviĝi la prelegaron faritan la Zamenhof-tagon en Centro Cultural Galileo.

### **EKSPOZICIOJ PRI ESPERANTO**

Dum julio eblis viziti la ekspozicion "Esperanto, lengua y cultura" samtempe en du lokoj en Madrido: dum la tuta monato en biblioteko José Hierro, strato Rafaela Ybarra, kvartalo Usera, kaj dum la dua duono de julio kaj komenco de aŭgusto en la restadejo Colegio Mayor Chaminade, Ciudad Universitaria, apud la metro-haltejo Metropolitano, iom antaŭ kaj koincide kun la kongreso de SAT.

Post ties fino, la paneloj vojaĝis al Kantabrio, kie ili estis ekspoziciitaj en la urbo Argoños.

### **KONGRESO DE SAT**

Kiel ni informis en pasintaj numeroj, inter la 28-a de julio kaj 4-a de aŭgusto disvolviĝis en Madrido la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda. Ĝin organizis la asocio SAT-en-Hispanio (SATEH), sub ĉefa kunordigo de Pedro Sanz kaj José M<sup>a</sup> Salguero (Kani).

La kongreson partoprenis ĉirkaŭ cent aliĝintoj, el ĉiuj kvin mondaj kontinentoj, plus diversaj aliaj homoj kiuj ĉeestis diversajn programerojn, danke al la malferma karaktero de la evento.

Dum matenoj okazis ĝenerale kunvenoj de SAT kaj ties rondoj, frakcioj kaj fakoj. Vespere oni organizis plurajn prelegojn, inter ili de madridaj esperantistoj Miguel Fernández, Jorge Camacho, Manolo Pancorbo, Pedro Zurita, Félix Jiménez Lobo, Toño del Barrio, sed ankaŭ de vizitantoj, kaj eĉ de neesperantistoj, kiuj foje sin esprimis parte en Esperanto aŭ profitis je la sinsekva interpretado de Jorge Camacho. Oni povis ĝui koncerton de JoMo, partopreni duan version de la spektaklo "Vivu la teatro!" aŭ spekti filmojn, kiel la mallongan "Mondcivitanoj", kun partopreno de Pedro Sanz, aŭ la de SAT produktitan "Esperanto", kiun MEL baldaŭ montros en interna kunveno. Estis prezentitaj krome pluraj libroj ĵus eldonitaj.

Dum la kongreso, kun kunlaboro de HEF kaj MEL, estis organizita ekspozicio, kurso de Esperanto kaj publika prezentado de la lingvo en la hispana. Ampleksa Libroservo estis je ĉies dispono dum tiuj tagoj.

Oni ekskursis trifoje en Madrido mem. Por la unua ekskurso tra Madrido oni eliris el la Sunporda Placo (*Puerta del Sol*), kaj vizitis la centrajn vidindaĵojn, ĝis Tirso de Molina (kie okazis akceptado ĉe sindikatejo de CNT). La dua ekskurso tra Madrido komenciĝis kiel omaĝo ĉe la statua monumento al advokatoj de Atoĉa, kun kanto kaj oferdono de po unu dianto fare de reprezentantoj de la kvin kontinentoj; poste oni vizitis aliajn lokojn de la urbocentro. La tria ekskurso tra Madrido komenciĝis ĉe placo Cibeles al Pordego Alkalao, tra Parko Retiro (baseno, promenejo Kubo ĝis la statuo de la Diablo).

Tuttaga dumkongresa ekskurso celis al Toledo. Post la kongreso estis organizitaj pliaj ekskursoj dum tri tagoj, respektive al la nordo de madrida regiono, al Segovio kaj al Avilo.

Multajn programerojn oni filmis, kaj post prilaborado de Miguel Gutiérrez Adúriz, ili estas iom post iom spekteblaj en la jutuba kanalo de SATEH <http://www.youtube.com/user/satehejo>.

Fotojn kaj aliajn informojn eblas vidi ankaŭ en <http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html>.

**ELDONITA LIBRO “Poezio: armilo ŝargita per futuro”**

Dum la SAT-kongreso estis prezentita la eldono de literatura antologio “Poezio: armilo ŝargita per futuro”, kiun formas verkoj el la engaĝita, progresema, plejofte politikrevolucia poezio ĉefe el hispania deveno. Ĝin eldonis la asocio SAT-en-Hispanio, kaj la baza kompilinto kaj tradukinto estas la iberskola poeto Miguel Fernández. La libro enhavas pecojn de Federico García Lorca, Rafael Alberti kaj aliaj verkistoj de la t.n. Generacio de 1927, kaj ankaŭ postaj poetoj kiel Miguel Hernández, León Felipe aŭ Gabriel Celaya, el unu el kies versoj estas elprenata la titolo.

La verko ja estas impona, kun pluraj centoj da poemoj, kaj klarigaj notoj kaj enkonduko. Ĝi estos aĉetebla en la madrida sidejo.

**UNIVERSALA KONGRESO**

Pli ol milo da esperantistoj partoprenis en Rejkjaviko (Islando) en la 98-a Universala Kongreso, inter la 20-a kaj 27-a de julio, kun komuna temo “Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvo-komunumoj”. Hispana Esperanto-Federacio estis reprezentita kiel asocio en la Movada Foiro, montrante siajn agadojn kaj planojn, inter kiuj la Hispanan Kongreson. Nome de esperantistoj el Hispanio salutis la kongreson la vicprezidanto de HEF, Ángel Arquillos, kiu ankaŭ reprezentis la asocion en la kunvenoj de la komitato de UEA. Dum la kongreso oni renovigis la estraron de Universala Esperanto-Asocio. Nova prezidanto fariĝis Mark Fettes.

**PREMIOJ AL JORGE CAMACHO**

Jorge Camacho gajnis premion “Luigi Minnaja” en la Belartaj Konkursoj de UEA 2013 pro sia verko “De hajko al hajko”. Jorge ricevis ankaŭ de UEA Diplomon pri Elstara Arta Agado “pro kontribuo al la originala Esperanto-literaturo”.

**KURSOJ**

Juan del Castillo plu instruas Esperanton je du niveloj ĉiun sabaton en la mateno. Tiu instruado okazas en Centro Gallego, strato Carretas 14, 3<sup>a</sup> etaĝo (ĉe la kafejo)

**VIZITIS NIN**

Okaze de la SAT-kongreso vizitis Madridon esperantistoj el ĉiuj mondopartoj kaj el preskaŭ ĉiuj regionoj el Hispanio. Ekzemple, ni povis profiti ĉeeston de samideanoj el Aŭstralio, Usono, Brazilo, Madagaskaro, Japanio, Koreo, Rusio, Rumanio kaj multaj eŭropaj landoj. Bedaŭrinde ne povis alveni, pro rifuzo de vizo, esperantistoj el Malio kaj Komoroj.

Krom tio, komence de julio, partoprenis babilrondon la belga samideano Heidi Goes. Pedro Albeirice, universitata profesoro el Brazilo vizitis Madridon fine de julio. Kanada samideano Jean Guy vizitis nian urbon fine de aŭgusto kaj renkontiĝis kun madridaj kursanoj.

**VENONTAJ RENKONTOJ**

Dum septembro rekomenciĝos la kutimaj kunvenoj de MEL, ĉiulunde post la 18,30.

Unua babilrondo post la somero okazos kiel kutime, en la Kuboplaco je la 17,30, la sabaton 7-an de septembro. Se estos bona vetero, ni povos renkontiĝi en teraso de kutima kafejo.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrیده/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده/) kaj en retejo <http://www.esperanto.es/mel>.

**madrida esperanto-liceo**

San Alejandro 6-4<sup>o</sup>B-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)

